Johannes R. Becher,

# Kristnasko

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ekfloras nun en blanka vest'
la vintro en branĉaro.
Solece frostas birdo-nest',
la sonorilojn la krist-fest'
sonigas tra l' flokaro.

La spac' sin klinas super ni,
kaj ankaŭ ni kliniĝas.
Jen nova stel' ĉe la abi'.
Infan-songĝece brilas ĝi,
elbranĉe ĝi vidiĝas.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnacht" de* Johannes R. Becher *(∗1891-05-22 – †1958-10-11) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2002-12-02.*

*MR-393-2 / Arg-794-1590 (2013-01-22 22:14:02)*